Bijvoegsel "Esperanto-nov^ajoj" n° 12

T R I L A N D A E S P E R A N T O - K O N G R E S O
27. - 31. 3. 1970 Aachen / FRG
Loka Kongresa Komitato: 51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172

D U A I N F O R M I L O oktobro 1969
==========

Plenkunsidoj de LKK okazis ĝis nun dufoje en Aachen kaj po unu fojon en Maastricht (Nederlando) kaj Jalhay (Belgio); krome kunvenis plurfoje LKK-membroj de Aachen kaj Stolberg. Rezultis el la du lastaj kunsidoj jenaj konkretigoj de la preparoj:

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredo, 27.3.70: 1) komuna kunsido de LKK kaj la estraroj de la tri organizantaj Landaj Asocioj de UEA; 2) interkoniga vespero; 3) komenciĝo de la Internacia Junulara Renkontiĝo;

Sabato, 28.3.70: 1) kunsidoj de la estraroj; 2) gazetara konferenco; 3) fak-kunsidoj; 4) SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO; 5) vizito al urbaj vidindaĵoj; 6) fak-kunsidoj; 7) teatro;

Dimanĉo, 29.3.70: 1) di-servoj en Esperanto; 2) KUNSIDOJ DE LA KONGRESAJ SEKCIOJ pri la lingva situacio en la ekzistantaj eŭropaj institucioj kaj en unuopaj ŝtatoj, pri la lingva situacio en estonta unuigita Eŭropo kaj pri ĉiutagaj lingvaj malfacilaĵoj en diversaj landoj; 3) administraj kunsidoj; 4) kongresa balo;

Lundo, 30.3.70: TUTTAGA TRILANDA EKSKURSO: Aachen - Heerlen - Valkenburg - Verviers - Spa - Malmédy - Kalterherberg - Monschau - Rur-lago - Aachen;

Mardo, 31.3.70: 1) vizito al la urbo aŭ migrado tra ĉelimaj arbaregoj; 2) eventuale: vizito al la atom-reaktoro Jülich.

Ĝis sabato, 4.4.70: daŭrigo de la Internacia Junulara Renkontiĝo en la junulargastejo de Aachen.

LKK studas ankoraŭ eblecojn aranĝi 1) oratoran konkurson de la junularo, 2) debaton pri temo kiel "La funkcioj de UEA kaj ties Landaj Asocioj", 3) laborkunsido(j)n pri la agado de Esperanto-asocioj ĉe eŭropaj institucioj, 4) kunvenon de la diversnaciaj partoprenantoj en la testo de H.Behrmann "Esperanto programita".

TRILANDA EKSKURSO: Oni forveturos matene je la 8-a horo kaj, zigzaginte tra la moderna parto de Heerlen (centro de la Limburga industrio), haltos en la agrabla turisma urbeto Valkenburg. Traveturinte Verviers oni paŭzetos en Malmédy, kaj tagmanĝon oni faros en la surlima Kalterherberg. Poste oni

pasos pitoreskan Monschau kaj iros al la vastega Rur-lago, sur kiu oni preskaŭ horon ŝipveturos. Inter la 18-a kaj 19-a horoj la aŭtobusoj reestos en Aachen. Tiu ĉi ekskurso donos al la partoprenantoj aŭtentikan impreson pri la karaktero de tiu regiono triŝtata, kiun oni emas nomi iom optimisme "lando sen limoj".

FAKAJ KUNSIDOJ: Organizontoj de fak-kunsidoj bonvolu turni sin al LKK antaŭ 31.12.69.

TRANOKTADO: Ĉiu aliĝinto ricevos ĉambromendilon kaj urbomapeton kun listo de hoteloj. La hotelaj prezo-kategorioj estas jenaj kvar: (1) pli ol gm 30,--, (2) gm 20,-- ĝis 30,--, (3) gm 15,-- ĝis 20,--, (4) ĝis gm 15,--. Tiuj ĉi prezoj inkluzivas (po persono) tranokton, matenmanĝon, servomonon kaj impostojn. --- Disponeblos ankaŭ malmultekosta amasloĝejo (unu nokto kostos proks. gm 4,--, matenmanĝo krome gm 2,50), kiu situas tuj apud la kongresejo.

KOTIZOJ: (1) kongresano gm 12,--, edz(in)o 6,--, junulo (inter 15- kaj 25-jara) 5,-- (post 31.12.69 ĉiuj kotizoj plialtiĝos je gm 3,--); infanoj malpli ol 15-jaraj ne pagos kongreskotizon;
(2) la tuttaga trilanda ekskurso kostos gm 20,-- inkluzive aŭtobusan vojaĝon, tagmanĝon (sen trinkaĵoj) kaj ŝipvojaĝon;
(3) partopreno en la Internacia Junulara Renkontiĝo de BEJA, GEJ kaj NEJ kostos 80,-- gm (gejunuloj malpli ol 25-jaraj, kiuj cetere ĝuos la kutimajn altajn subvenciojn) respektive 100,-- gm (pliaĝuloj). Tiuj kotizoj kovras 8-tagan restadon kaj 3 ĉiutagajn manĝojn en la junulargastejo kaj la kongreskotizon; aliĝo validos nur se estos antaŭpagitaj gm 20,-- (krom antaŭpago NE necesas ĝiro de kongreskotizo).

HONORA PROTEKTANTO estos la ĉefurbestro de Aachen, s-ro Heusch.

HONORA KOMITATO estas starigata; ĝin eniris la du belgaj ministroj pri edukado s-roj Parisis (franca kulturo) kaj Vermeylen (nederlanda kulturo), prof. d-ro Hans Furler, viceprezidanto de la Eŭropa Parlamento, kaj s-ro Josef Effertz, prezidanto de la t.n. Registara Distrikto Aachen.

(sign.) A. U e b a g s
LKK - Prezidanto